



MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 5

MAJO 2026 Kol. 489/42

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

Enhavo: Proverboj - majo, Pri proverboj, Ne mortadu betulo,
Inĝ. Jan Kaŝpar, Blinduloj en novaj manoj, E-mental' en ZOO,
Feliĉa fino de vagado.

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

Popolaj proverboj en Ĉeĥio - majo

Se majo pri humido avaras, junio pli da akvo alportas.

Se estas pluva majo, atendos nin paradizo.

Majo pluva - oktobro soifa.

Malvarma majo - se malsekas - la vino al la fundo sinkas.

Malseka majo - paradizo en la garbejo.

Seka majo - malseka junio, malseka majo - seka junio.

Pri proverboj

Proverboj estas diraĵoj, kiuj apartenas al la popola kulturo kaj peras konojn pri la vivo. Ili estas plejparte anonimaj kaj plenaj de ĉiutagaj priparoloj. Oni trovas proverbojn por preskaŭ ĉiuj situacioj.

Nuntempe, mi aŭdas proverbojn nur el la buŝoj de la maljunuloj aŭ legas ilin en libroj. Kiam mi lernis en nia baza lernejo, nia instruistino ordonis al la gelernantoj kopii proverbojn en apartajn kajerojn, celante plibonigon de nia kaligrafio. Mi bone memoras kelkajn el ili:

1. Dum la manĝado venas apetito.
2. La lango de virino estas ŝia glavo.
3. Vivo sen modero kondukas al mizero.
4. Okazo kreas ŝteliston.
5. Tolaĵon malpuran lavu hejme.
6. Amiko de mia amiko estas ankaŭ mia amiko.
7. Amikeco parte, ofico aparte.
8. Pli bone malfrue ol neniam.
9. Mensoganto devas havi bonan memoron.
10. Pli bonas io ol nenio.
11. Amiko fidela estas trezoro la plej bela.
12. Feliĉo kaj riĉeco envion elvokas.
13. Ĉe stomaka malsato ne kapricas palato.
14. Se malsato turmentas, lupo timon ne sentas.
15. La amo estas blinda.
16. Ŝajno trompas.
17. Malfeliĉo venas rajde, foriras piede.
18. Kiu timas pri bestaro, ne iru al la arbaro.
19. La luno ne aŭskultas, kiam hundo ĝin insultas.
20. Ne gutas mielo el la ĉielo.



Liette Lêla

(Reviziis: Célio Freitas Martins)

Ne mortadu betulo

Betuloj pozicias iom kontraŭstare. Ili ĉiam simbolis renaskiĝon, bonon, protekton kaj reziston. Ili estis simbolo de travivo eĉ en la plej krudaj kondiĉoj. Aliflanke, tio al ili alportis ankaŭ reputacion de fiherbo, kiun ne estas damaĝe forigi. Kontribuis al tio alergiuloj, kiuj ternas pro diversaj kialoj, sed eble plej ofte ĝuste pro betulo.



Sed ĉiam pli evidentiĝas, ke betulo ne tiom estas senutila fiarbo, kiom arbo kun ŝlosila pozicio en la tuta ekosistemo.

Ili estas la unuaj, kiuj koloniigas pertorbitajn areojn, trafitajn de incendio, inundoj aŭ arbohakado. Ili produktas amasegon da semoj, kiuj tre baldaŭ falas al damaĝitaj areoj, enteriĝas tie, iliaj radikoj aerumas la grundon, tiel ebligante pli bonan

nutraĵsorbadon kaj enfiltriĝon de akvo, kaj estas esencaj por malhelpi grunderozion. Ili tiel kreas kondiĉojn por la kresko de aliaj plantspecioj.

Betuloj same povas ligi signifan kvanton da karbondioksido, tiel helpante mildigi la efikon de forcejgasaj emisioj. Krome, ili funkcias kiel naturaj aerfiltriloj: ili detenas polvon kaj poluaĵojn. Ili al birdoj, malgrandaj mamuloj kaj abeloj donas ankaŭ ŝirmejojn kaj manĝaĵojn. Multaj bestoj kaj birdoj konstruas siajn ŝirmejojn aŭ nestojn el iliaj flekseblaj branĉoj. En la kavaĵoj de maljunaj arboj nestas paruoj, vespertoj kaj aliaj etaj mamuloj. Kiam arbo terenfalas, ĝia ligno rapide putriĝas kaj kreas tiom multe bezonatan grundan humon.

Ĉu vi iam printempe metis vian orelon al betula trunko kaj ekaŭdis iun mallaŭtan susuran sonon? Tio estas la fluido, fluanta de la radikoj al la branĉoj, kiuj bezonas multe da fluidaĵo por formi siajn burĝonojn. Ĝuste la betulaj burĝonoj, sed ankaŭ ĝiaj junaj folioj, bezonas multajn aktivajn substancojn, kiel flavonoidoj, taninoj, betulino aŭ vitamino C.

Onidire la printempa betulo estas natura apoteko, kiu ofertas helpon kontraŭ iu ajn malsano.

La blanka parto de betula ŝelo havas antiseptajn ecojn. Jam en la antikvaj tempoj estis al vundo aplikata peco da ŝelo por akceli resaniĝon. Ĝi mirakle kuracis eĉ pusajn vundojn aŭ malbone resaniĝantajn ulcerojn. Girlando farita el ŝelo laŭsupoze kapablis forigi grandajn kapdolorojn. Koncerne betulan ŝelon, temas pri la substanco betulino, kiu havas vere terapiajn ecojn, kaj estas vaste uzata en dermatologio. Ĝi havas haŭtinflamajn kontraŭefikojn, antaŭenigas vundkuracigon, helpas kontraŭ atopika kaj kontakta dermatito kaj psorazio. Ĝi estas bonega natura antioksidanto kun la kapablo malaltigi kolesterolnivelon kaj plibonigi insulinsentemon.

Betulfolioj estas bonega diurezilo taŭga kontraŭ reŭmatismo, podagro, renaj kaj urintraktusaj malsanoj. Banoj en betulfolia dekoktaĵo efikas kontraŭ reŭmatismo aŭ ŝveloj. La substancoj en ili solvas kaj forlavas sablon kaj ŝtonojn en la urina traktuso, kaj ili ofte formas la bazon de temiksaĵoj por malpeziĝo.

Vi eble jam aŭdis pri la mirakla fungo ĉago (*Inonotus obliquus*). Ĝi kreskas el la trunkoj de fraksenoj, poploj kaj kverkoj, sed la plej efika ĉago kreskas sur betuloj. Ili enhavas betulinacidon, kio klarigas, kial homoj en la pasinteco sukcesis kuraci preskaŭ ĉion per ĉi tiu fungo.

La artikolon „Neumírej, břízo“ (Ne mortadu, betulo) en la revuo Květy (Floroj) elektis kaj ĝin mallongigis Eva Pazourková. Esperantigis Fejfi.

Inĝ. Jan Kašpar, la unua ĉeĥa aviadisto (1883-1927)

La 13-an de majo 2026 estos la 115a datreveno de la unua translanda flugo de la unua ĉeĥa aviadisto. Jan Kašpar devenis el la riĉa familio en Pardubice, lia patro posedis faman hotelon



studis bazlernejon, reallernejon kaj fine la nejon en Prago.

En la jaro 1908 li eklaboris en la germana firmao en la urbo Altena. Post reveno en Ĉeĥion li laboris en la firmao Laurin&Klement en la urbo Mladá Boleslav. Sed jam komence de julio li revenis en sian naskiĝurbon Pardubice, kie li kun sia kuzo Inĝ. Evžen Čihák komencis konstrui aviadilon. Ilia kunlaboro daŭris nur kelkajn monatojn.

Jan pli frue konstruis monoplanon laŭ la modelo de la aviadilo *Antoinette*, laŭ la

franca konstruktoro Latham. La 25-an de julio 1909 la franco Louis Blériot transflugis Manikan kanalon.

Kašpar sian aviadilon finkonstruis, sed bedaŭrinde ne sukcesis per ĝi flugleviĝi pro ĝia granda pezo kaj malgranda motorpotenco. En marto de la jaro 1910 Jan Kašpar forveturis en Parizon kaj en *Blériot*-fabriko li aĉetis la aviadilon *Blériot XI*.

La unuan sukcesan flugon li realigis la 16-an de aprilo 1910, kiam li flugis dukilometran linion en alto de 25 metroj. Post ricevo de pilot-permesilo li prezentis por miloj da spektantoj ekflugon kaj sukcesan alteriĝon en la flughaveno de Pardubice. Tion sekvis publikaj prezentaĵoj en la urboj Hradec Králové,



Fine de la jaro 1910 Jan Kašpar posedis jam tri aviadilojn, kaj planis translandan flugon en Ĉeĥio. Unue li provis dum la

flugo orientiĝi laŭ la itinero inter la urboj Pardubice - Chrudim kaj reen, kiu en alto de 400 metroj daŭris 24 minutojn.

La legenda flugo Pardubice – Praha (Velká Chuchle), kiu famigis lin, okazis sabate la 13-an de majo 1911. Li traflugis la distancon de 121 kilometroj en 92 minutoj 800 metroj alte.

La aviadilon, per kiu la flugo (kaj ceteraĵoj) okazis, li donacis en la jaro 1913 al la Nacia Teknika Muzeo en Praha.

Li kraŝis dum alia flugo, transvivis, kaj poste postenis en fluglernejo. Lastfoje publike li flugis la 28-an de julio 1912 en la urbo Jindřichův Hradec. Sed fakte tiam sensukcese.

La definitiva fino por li estis la Unua Mondmilito, kiam li laboris kiel teknikisto en avert-trupo.

Jan Kašpar forlasis vivon per memmortigo la 2-an de marto 1927. Li estas entombigita en la Centra Tombejo en Pardubice.

Kompilis kaj tradukis Pavel Nechvíle

Blinduloj en novaj manoj

Mi estas la nova komitatano A, nome reprezentanto de la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, LIBE. En tiu ĉi funkcio mi estas la posteulo de Rob Moerbeek. Mi esperantistiĝis en 1986. Ekde 1987 mi estas prezidanto de la Nederlanda Societo de Blindaj kaj Malfortevidantaj Esperantistoj, NoSoBE. Ĝis la fino de 2011 mi regule partoprenis en UK-oj. En pasintjara aprilo mi fariĝis volontulo ĉe UEA. Mi interalie kontrollegas la materialon por revuo *Esperanto*, kunlabore kun ĝiaj redaktoroj Dima kaj Anna. Interalie mi kunlabore kun Ralph Schmeits okupiĝas pri la alirebleco de revuoj *Esperanto* kaj *Monato* por vidhandikapitoj. En mia funkcio de Komitatano A mi esperas, ke mi nome de LIBE povos fruktodone reprezenti la

Klub E - mental' en ZOO



La 21-an de februaro 2026 okazis en la praga ZOO la tradicia adopto-festo de

la porkino Emička. Jam en 2010 la klubo E-mental' adoptis porkinon (tajasuon), por kies honoro ni ĉiujare renkontiĝadas en la zoologia ĝardeno, kie ni tion festas kune. La festo estas ligita



al la kolektado de mono por la sekva jaro de adopto, kaj krome okazas ankaŭ la konkurso pri la plej belaj kaj la plej bongustaj unubuŝaĵoj. La kolektita mono estas uzata por aĉeti manĝaĵon ankaŭ por aliaj bestoj - ekzemple varano, vombato, vulturo kaj

aliaj. Kaj la ĉiuj unubuŝaĵoj estis formanĝitaj. Ĉi-jare ĉirkaŭ 25 esperantistoj ne nur el Ĉeĥio, sed ankaŭ el Ukrainio, Slovakio kaj Francio, partoprenis la feston. Ni ĉiuj antaŭĝojas la venontan jaron.

St. Nováková

Feliĉan finon de sia vagado havis maljuna rulseĝulino



Ŝi ekvojaĝis en la regionon Hodonín kun aliaj turistoj, sed ŝi postrestis survoje, do la grupo perdis ŝin el vido. Ĉar la vetero subite ŝanĝiĝis kaj venis ŝtormo, la turistoj ŝanĝis sian itineron kompare kun la originala plano, pri kio la rulseĝulino tute ne sciis. Ŝi plu ruliĝis sur tervojo, kiu iom post iom pro la forta pluvego fariĝis marĉo. Ŝi en tute nekonata loko restis kaptita en sia



rulseĝo en malfacila tereno. Feliĉe, ŝi kunhavis sian poŝtelefonon kaj povis voki helpon. La polico devis trovi kaj savi ŝin, kaj kune kun la fajrobrigadistoj liberigis ŝin. La tereno estis tiel malfacila, ke la polica aŭto preskaŭ blokiĝis en la koto.

Jarka Zigáčková

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**

Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**

IBAN: CZ3520100000002801322017 **SWIFT/BIC:** FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **22 €** (en kovertoj), aŭ **11 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **400,-Kč** (v obálkách), nebo 200,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte **vaše příjmení** jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.